

norvega skyttelkjøring  
 pola ruch wahadłowy bez przestawiania lokomotywy  
 rumana circulație reversibilă  
 slovena povratna vožnja s spremembo smeri

Du ŝanĝproponoj:

- 1) trakcimaniero trena-puŝada
- 2) trakcio lokomotiva-stirvagona


Plia problemo temas pri komuna veturo de du motorvagonaj trajnoj, ĉi ekzemple en ĉeĥa-germana limregiono laŭ la skizo:

Trajno 86226 *Sokolov (Sv) – Zwickau (Zk)* veturas inter *Zwotental (Zt)* kaj *Falkenstein (Fs)* kuplita kun trajno 83226 *Adorf (Af) – Hof*.

Tion tuŝanta difinita nocio estas 09153 „partotrajno sekundara (por plurgrupa trajno)“:

**09153** Vagonaro kunmetita el pasaĝervagonoj de diversaj trajneliraj stacioj.

bulgara *вторична част от влака*  
 ĉeĥa *sběrný vlak*  
 dana *opsamlingstog*  
 franca *train de ramassage*  
 germana *Flügelzug*  
 hungara *gyűjtővonat*  
 itala *treno raccogliitore*  
 kroata *vlak za zbirnim brutom*  
 norvega *oppsamlingstog*  
 pola *pociąg zdawczy manewrowy*  
 rumana *tren colector*  
 slovena *dostavni vlak*



Ĉar laŭ la difino temas pri duobla vagonaro - ĉi ekzemple inter Zt kaj Fs, jen tri ŝanĝproponoj:

- 1) pasaĝervagonaro plurtrajna
- 2) pasaĝervagonaro dutrajna
- 3) pasaĝervagonaro duobla

Ankaŭ la nedifinita nocio **02421** „trajnduobligo“ povas koncerni ĉi tiun aferon, aŭ/kaj entrafikigon de antaŭa (09184) aŭ sekva (09185) kromtrajno - kun trajndistancigo.

bulgara *двоен влак*  
 ĉeĥa *zdvojené vedení vlaku*  
 dana *dublering af et tog*  
 franca *dédublement d'un train*  
 germana *Doppelführung eines Zuges*  
 hungara *vonat megkettözése*  
 itala *sdoppiamento di un treno*  
 kroata *vožnja vlaka u dva dijela*  
 norvega *dublering av tog*  
 pola *uruchomienie pociągu „bis“*  
 rumana *tren partea a doua*  
 slovena *vožnja vlaka v dveh delih*

Pro manko de difino ne eblas pli klarige modifi la terminon **trajnduobligo**.

Scivoleme mi atendas viajn opiniojn.

Bonan sanon kaj interesan aŭtunan cerbumadon amike deziras

*Heinz Hoffmann.*

## Terminara Kuriero

TeKu 142

Septembro 2011

### Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingor

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: Hoffmann-IFEF@cablemail.de

#### Karaj gekolegoj,

baldaŭ mi povos informi vin pri eblo ricevi kaj uzi *CD-ROM*-diskon kun pli ampleksa enhavo de la datenbanko *UIC TermEdit*, kaj pri eblo aliri tiun terminaron en Interreto. *UIC* pligrandigis la lingvonombrojn al 24. La 5 aldonaj lingvoj estas araba, irana *Farsi*, kroata, norvega kaj slovena. Pri detaloj okazos 19-an de Oktobro *UIC*-kunsido en Lisbono. Do tio estos temo por TeKu 143.

Nun post somera paŭzo mi prezentas la kunsidajn rezultojn en *Liberec*, kaj petas vin laŭeble kontribui al kelkaj novaj terminaj taskoj.

#### Diskutrezultoj en *Liberec*

La partoprenantoj de du terminaraj kunsidoj ĉe 63-a IFEF-Kongreso decidis jenajn terminojn:

		en TeKu
00198	trakforko laŭpinte envetura	141
00231	trakforko elvetura	141
00365	trakforka sekurigilo	
	kun artikoj	140
02054	relo frogopinta komplementa	140
02441	liberigo de trako (veturiloj)	141
02442	liberigo de trako (obstakloj)	141
03527	veturvojo surpiliera	141
	laŭ nova propono sendita de <i>Jan Werner</i>	
03732	signalo por permesiva veturo	139
04255	tordita trako	141
	laŭ nova propono sendita de <i>Jan Werner</i>	
07681	niveldiferenco ĉe reljunto	141
09389	frogoaranĝo duobla	140
09617	trakforka sekurigilo	
	kun agrafoj	140
09975	indikilo de lini-okupiteco	
	(por trakciilkondukisto)	139



Faka ekskurso en *Liberec* al telfero ĉe monto *Ještěd*

en TeKu

09978	indikilo de trakokupiteco (regejo)	139
12927	relo frogopinta ĉefa	140
99836	frogoaranĝo simpla	140

Koncerne nocio 08143 *Vito Tornillo* klarigis, ke ne estas sinonimeco kun 03732. Sekve la nocio restas diskutenda. Mi traktos ĝin sub „Novaj taskoj”. La difino de 03732 restu kiel en TeKu 139, paĝo 2.


Post peto pri helpo al tradukado de pliaj UIC-difintekstoj, precipe el angla kaj franca lingvoj, kolego *E Henning Olsen* afable esprimis sian pretecon. Dankon al li.

### Novaj taskoj

Jen ripeta trakto de nocio el TeKu 139, paĝo 3:

**08143** Signalo permesanta atente malrapidan preterpason ĉe haltindika signalilo al eventuale okupita trako.

ĉeĥa	<i>přivolávací návěst</i>
dana	<i>rangergrænsemærke</i>
franca	<i>signal d'appel en manoeuvre</i>
germana	<i>Einrücksignal</i>
hungara	<i>tolatási hatarjelző</i>
itala	<i>segnale di chiamata in manovra</i>
kroata	<i>ranžirni signal za zaustavljanje</i>
norvega	<i>varselsignal ved sporskifte</i>
pola	<i>sygnał wstrzymania manewrowania</i>
rumana	<i>semnal de chemare la manevră</i>
slovena	<i>signalni znak: „premik prepovedan”</i>



Italaj haltindikaj ĉefsignaliloj kun signaloj  
08143 kaj 03732

En la difino mankas karakterizaĵo, kiun tuŝas franca, itala, kroata, pola kaj rumana terminoj, nome mencio de manovrado (al stacia trako). Laŭ ekspliko de nia itala kolego *Vito Tornillo* temas ne pri permesiva veturo en eksterstacia bloksekcio, sed pri enveturo en stacion aŭ pluveturo en alian staciparton. Nacia reglamento povas ordoni, ke la en- aŭ pluveturo okazu ne kiel trajn-, sed kiel manovra veturo. La signalo estas speco de signalo substitua (08152).

Ŝanĝpropono: **signalo substitua por laŭvida veturo**

**07134** Motorvagonaro ambaŭkape havanta kondukistejon.

bulgara	<i>влак, който се връща обратно</i>	itala	<i>convoglio reversibile</i>
ĉeĥa	<i>vlak kyvadlové doprava</i>	kroata	<i>vlakovna garnitura prikladna za vožnju u oba smjera</i>
dana	<i>styre vogntog</i>	norvega	<i>pendeltog</i>
franca	<i>rame réversible</i>	pola	<i>pociąg nawrotny</i>
germana	<i>Wendezug</i>	rumana	<i>tren navetă</i>
hungara	<i>ingavonat</i>	slovena	<i>obojestranski motornik</i>

Du ŝanĝproponoj:

1) motorvagonaro ambaŭkape kondukebla

2) motorvagonaro kun ambaŭkapaj kondukistejoj

Pri lokomotivtrakcia trajnkompleto ekzistas nedifinita nocio

**09047** „karuseltrajno” kaj difinita nocio 09165 „navetrajno”:

**09165** Trajnkompleto kun lokomotivo ĉe unu kaj stirvagono ĉe la alia vagonarkapo, kiu sen ŝanĝo de sia konsisto estas normalrapide veturigebla en ambaŭ direktoj.

	09047	09165
bulgara		<i>влак, който се връща обратно</i>
ĉeĥa	<i>kyvadlový vlak</i>	<i>vratný vlak</i>
dana	<i>„karusel”-tog</i>	<i>styre vogntog</i>
franca	<i>train-carrousel</i>	<i>train réversible</i>
germana	<i>Pendelzug</i>	<i>Wendezug</i>
hungara	<i>ingavonat</i>	
itala	<i>treno con percorso circolare</i>	<i>convoglio reversibile</i>
kroata	<i>kružni vlak</i>	<i>povratni vlak</i>
norvega	<i>pendeltog</i>	<i>vendbart tog</i>
pola	<i>pociąg wahadłowy</i>	<i>pociąg nawrotny</i>
rumana	<i>tren pendular</i>	<i>tren navetă</i>
slovena	<i>krožni vlak</i>	<i>motornik za obe smeri vožnje</i>

Ĉar al pluraj nacilingvaj terminoj 09047 estas aldonita la noto „sen translokado de lokomotivo”, mi proponas konsideri tiujn du terminojn sinonimaj, do elekti saman Esperanto-terminon laŭ la hungara ekzemplo. Du ŝanĝproponoj:

1) trajnkompleto trena-puŝada

2) trajnkompleto lokomotiva-stirvagona

Por traccimaniere laŭ 09047/09165 ekzistas difinita nocio 05442 „navettrafiko”:

**05442** Traccimaniere, ĉe kiu trakciilo kuplita ĉe unu kapo de vagonaro, trenas aŭ puŝadas ĝin, kaj la trakciilo estas ambaŭkaze stirata de kondukistejo ĉe la respektiva trajnkapo.

bulgara	<i>обратен трафик</i>
ĉeĥa	<i>kyvadlová jízda</i>
dana	<i>kørsel med styrevogn</i>
franca	<i>marche en réversibilité</i>
germana	<i>Wendezugbetrieb</i>
hungara	<i>ingavonati közlekedés</i>
itala	<i>marcia reversibile</i>
kroata	<i>povratna vožnja bez promjene položaja lokomotive</i>

Jam delonge mi volas malimpliki la ĥaŝon ĉe la radiko „navet-“, sed nur antaŭ nelonge aperis kelkaj klarigaj difinoj. Komence rimarku, ke 2002 oni en PIV ŝanĝis „navet-“ al „naved-“. Tie navedo estas ilo por teksomaŝino, per kiu la veftofadeno estas transportata laŭ ir-reira movo. La dua adjektivo „naveda“ signifas „ir-reira“. Kie en trafiko indas uzi la radikon? Unue koncernas pasaĝeron, kiu en mallongaj intertempoj (ĉiutage) veturas per trafikilo tien-reen inter du lokoj (loĝloko kaj laboraŭ lernejo). Tiukoncerne *UIC TermEdit* enhavas noción **05572 „navetulo“**, sen difino. Verŝajne ne estas iu dubo.

Nur necesas korekto propono: **navedulo**

Se temas pri trafiko precipe por tiaj pasaĝeroj, ekzistas nedifinitaj nocioj **05573 „trafiko navetrajna“** kaj **08974 „trafiko laboristara“**.

	<b>05573</b>	<b>08974</b>
bulgara		<i>работнически трафик</i>
ĉeĥa	<i>doprava do zaměstnání</i>	
dana	<i>pendlertrafik</i>	<i>bolig-arbejdsstedstrafik</i>
franca	<i>migrations alternantes</i>	<i>trafic domicile-emploi</i>
germana	<i>Pendlerverkehr</i>	<i>Berufsverkehr</i>
hungara	<i>ingaforgalom</i>	<i>munkábajáró forgalom</i>
itala	<i>spostamenti pendolari</i>	<i>traffico pendolare</i>
kroata	<i>odlazno-povratne vožnje</i>	<i>prijevoz na posao i s posla</i>
norvega	<i>pendling</i>	<i>arbeidsreise</i>
pola	<i>ruch wahađtowy</i>	<i>ruch spowodowany dojazdami do pracy</i>
rumana	<i>trafic pendular</i>	<i>trafic</i>
slovena	<i>promet dnevne migracije</i>	<i>redni prevoz dom-služba</i>

Du solvoj:

- 1) lasi tiujn du nociojn diferencaj kun la terminoj **trafiko navedula kaj trafiko laboristara**, ĉar lernantoj ankaŭ estas naveduloj, aŭ
- 2) konsideri la du terminojn sinonimaj, do elekti saman Esperanto-terminon laŭ la ĉeĥa ekzemplo, **aŭ 2.1) trafiko navedula aŭ 2.2) trafiko laboristara**.

Se temas pri trajno precipe por tiaj pasaĝeroj, ekzistas nedifinitaj nocioj **05837 „navetrajno“** kaj **09075 / 09136 „trajno laboristara“**.

	<b>05837</b>	<b>09075 / 09136</b>
bulgara	<i>влак, който се връща обратно</i>	<i>работнически влак</i>
ĉeĥa	<i>kyvadlový vlak</i>	<i>vlak určený pro přepravu do a ze zaměstnání; dělnický vlak</i>
dana	<i>pendlertog</i>	<i>pendlertog; arbejdetog</i>
franca	<i>train-navette</i>	<i>train domicile-emploi; train ouvrier</i>
germana	<i>Pendelzug</i>	<i>Berufszug</i>
hungara	<i>ingavonat</i>	<i>helyiérdekű munkásvonat; munkásvonat</i>
itala	<i>treno navetta</i>	<i>treno pendolare; treno operai</i>

	<b>05837</b>	<b>09075 / 09136</b>
kroata	<i>odlazno-povratni vlak</i>	<i>vlak za prijevoz na posao i s posla; radnički vlak</i>
norvega	<i>pendlertog</i>	<i>pendlertog; arbeidetog</i>
pola	<i>pociąg wahađtowy</i>	<i>pociąg do przewozów pracowniczych</i>
rumana	<i>tren navetă</i>	<i>tren suburban; tren de muncitori</i>
slovena	<i>vlak v migracijskem medmestnem prometu</i>	<i>delavski vlak; vlak za prevoz delavcev</i>

La solvoj respondas al tiuj pri trafiko, sed kun la terminoj **trajno navedula kaj/aŭ trajno laboristara**.

Dua kazo por trafikrilate uzi la radikon „naved-“ koncernas ripetan tien-reen-iro de veturiloj, kiuj normalokaze libere diversvoje cirkulas, nome varvagonoj. Por tio jam ekzistas nocio:

**10086** Varvagono uzata el ekonomiaj kaŭzoj en fiksj kursoj inter kargad- kaj malkargadstacioj.

La ĝisnuna termino **varvagono naveda** ne estas denove diskutinda.

Pri koncerna trajntrafiko ekzistas difinita nocio **08068 „servo navetrajna“**:

**08068** Trajntrafiko, ĉe kiu vagonaroj revenas al sia antaŭa elirstacio.

bulgara	<i>маневрено-вакoва служба</i>	itala	<i>servizio con treni-navetta</i>
ĉeĥa	<i>kyvadlová doprava</i>	kroata	<i>promet vlaku u oba smjera</i>
dana	<i>shuttle-trafik</i>	norvega	<i>skytteltrafik</i>
franca	<i>service de navette</i>	pola	<i>przewozy wahađtowe</i>
germana	<i>Pendelverkehr</i>	rumana	<i>trafic de navette</i>
hungara	<i>ingavonat-forgalmi szolgálat</i>	slovena	<i>migraci medmestni promet</i>

La difino povas koncerni kaj vartrafikon – nome kun navedaj varvagonaroj – kaj pasaĝertrafikon. Kvankam pasaĝervagonaroj ja preskaŭ ĉie iras-reiras, navedeca specialaĵo estas kurtistanca, precipe al- kaj interkonduka trafiko (07031, 11137) en mallongaj intertempoj – internacie vaste konigata kiel *shuttle*-trafiko.

Du ŝanĝproponoj:

- 1) trajntrafiko navedvagonara
- 2) trajntrafiko naveda

Tria motivo por trafikrilate uzi la radikon „naved-“ koncernas eblon konduki trajnkompleton de siaj ambaŭ kapoj, do sen neceso, antaŭ retroveturo manovrigi trakciilon al la alia kapo de la vagonaro. Tamen, por ne konfuzigi legantojn, mi tiukaze rekomendas ne uzi „naved-“, sed serĉi alian solvon.

Se temas pri motorvagonaro, ĉiu motorvagonkombinaĵo havas ambaŭkape kondukistejon. Sed ekzistas ankaŭ disigeblaj motorvagonaroj - kaj kun ambaŭkapaj kaj kun nur unukapaj kondukistejoj. Ĉe la lastaj jam malmodernaj konsistigoj necesas antaŭ retroveturo manovrigi la motorvagonon al la alia vagonarkapo. Por la unuaj du kazoj ekzistas nocio **07134 „navetrajno“**: